

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VOLEU APRENDRE L'ESPERANTO  
SOLS AMB 15 LLIÇONS?

Vegeu-ne els detalls a la  
plana 169 d'aquesta Revista

NOVEMBRO-DECEMBRO 1932

N-ROJ 188-189

Hi ha una manera indirecta de protegir la  
**Federació Esperantista Catalana:**

Comprar les coses que ella patrocina.

## **Kataluna Antologio**

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

## **Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto**

Edició de 4.000 llibrets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

## **Zamenhof - disko**

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.<sup>e</sup> Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport a part).

Adreceu-vos a \_\_\_\_\_  
CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj

Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

## MIRACLES ESPERANTISTES I CATALANISTES QUE BADEN

(De *La Publicitat*, del 24 de setembre de 1932)

.....

No és pas el primer vocabulari tècnic que surt en Esperanto, aquest que avui ens ocupa. Diferents homes de ciències de llengües naturals i diverses ja ens n'han donat de medicina, de matemàtiques, de mecànica i de música. No pas totes les llengües nacionals són avui un instrument lingüístic per a la tècnica com és l'Esperanto. Quan la Societat de Nacions, o bé una conferència internacional especial decidirà d'encomanar a una comissió de filòlegs famosos l'estudi d'una solució lingüística per a facilitar la intercomprensió, perquè tots els delegats de qualsevol llengua natural siguin prou dignes de no voler expressar-se en altra que en la pròpia o bé que en reclamin una de neutral comuna, ja no podran triar ni inventar res. Els savis filòlegs de tot el món, ja es trobaran amb l'esperanto, no solament genial en el seu fonament, sinó evolucionat, desenvolupat, apte per a totes les disciplines culturals a base de la paraula oral o escrita. Bon paper faran els filòlegs que no tindran res a fer per a resoldre el problema lingüístic més transcendental que els pugui haver estat encomanat. Però tanmateix ja podrien començar d'obrir els ulls, i advertir la gent que l'esperanto és un disbarat, i proposar una solució que sigui encertada, o bé prestar suport a l'esperanto per tal d'accelerar-ne la difusió i l'eficàcia. I evitar que un catalanista que va a veure els sòkols a Txecoslovàquia es planyi públicament que els txecs no posin inscripcions en idioma que ell

comprengui, que hauria d'ésser francès, alemany o castellà. No demana que sigui emprat un idioma neutral, ni el català, sinó, implícitament, un que no sigui ni dels txecs ni dels catalans, un privilegi a favor d'un tercer idioma que ja gaudeixi excés de privilegis. Tot això és lamentable ignorància de com es troba la qüestió de l'idioma internacional sota el prisma de la justícia i de la dignitat. I quan s'ofereix el fet que un natural eminent de llengua castellana com el senyor Francisco Azorín, o de la francesa com Charles Richet, o de l'anglesa com el professor Collinson, o de l'alemanya com el filòleg Steche, o de la italiana com Bruno Migliorini, etc., treballen per una llengua auxiliar neutral com l'esperanto, hom se sent avergonyit que un català catalanista demani l'ús internacional d'aquestes llengües que a Catalunya mateix s'imposen abusivament allà on el català hauria de senyorejar absolutament per la més elemental raó de justícia i de dignitat lingüística.

L'esperanto vol ésser la *segona* llengua de cada poble i de cada home. Segons l'esperantisme, un català no s'ha de rebaixar mai a parlar altra llengua que la pròpia o la neutral, mai no ha d'humiliar-se a parlar la llengua natural o nacional d'un altre home o d'un altre poble. Un català que no defensi la solució esperantista és ben llosc, ben unamunesc o ben *conllewant*. I ha de fer molta llàstima a un eminent esperantista de llengua nacional castellana, d'abast internacional, ha de fer molta llàstima al meu amic Francisco Azorín, que mentre ell treballa contra els privilegis internacionals dels idiomes que en gaudeixen com el castellà, un catalanista demani més ús internacional dels idiomes que en tenen excés, i justament contra els que en pateixen per defecte com el català i el txec. Aquest catalanista demà anirà a Irlanda i s'indignarà, sobretot si ha après quatre miserables mots anglesos, si els irlandesos a Irlanda anuncien en irlandès i no en anglès; s'indignarà com un de tants estrangers que volen a Catalunya imposar l'ús del castellà perquè ells l'havien après i no es pensaven ni volien pensar que existís el català.

Delfí DALMAU.

#### LLISTA DELS "AMICS DE KATALUNA ESPERANTISTO"

Enric Adam.  
S. Alberich Jofré.  
Josep Alberich.  
Valentí Alavedra.  
Jacint Bremon.  
Eduard Capdevila.  
Josep Casanovas.  
Ramon Cirera.

Antoni Codorniu.  
Jacint Comella.  
Delfí Dalmau.  
J. Font Giralt.  
Jaume Grau Casas.  
Maurici Orriols.  
Marian Solà.  
R. Torras Carreres.

## TRIOBLE TRI MINUTOJ

*Intervjuo pri AELA*

"Num post UEA, ICK, KR, LKK — ankoraŭ unu mistera organizaĵo!" mi kriis kun indigno, kiam mi legis prospekton de AELA. Fulmotondro! Kion ili volas? Monon? Kompreneble. Kion ili donas? Librojn. Ah — librojn! Jen alia afero. Ni rigardu. AELA volas doni al siaj membroj librojn, librojn kaj ankoraŭfoje librojn. Bone. La prezo? La kostoj? En tiu ĉi momento mi ekprenas mian kapon, miaj okuloj vastiĝas kiel aŭtoradoj, mi elkrias: "Bleier, vi bankrotos! Vi freneziĝis! Vi ruinigos vin mem, la eldonejon kaj nin kompatindajn verkistojn!!".

Rigardu! Programo de AELA por 1932: 6 libroj, preskaŭ sume 2000 paĝoj, inter ili originalaj kaj tradukitaj romanoj, riĉe ilustrita libro pri pentrarto, Hungara Antologio kaj — Enciklopedio de Esperanto, ĉiuj libroj kune en la valoro de sv. fr. 55.— riceveblaj por (nur!) 13 sv. fr. 50 centimoj.

Blufo? Aprila ŝerco? Simpla preseraro?... Mi kuregas al la telefona aparato. Mi devas averti, protesti en la nomo de la malsatantaj verkistoj...

"Hallo! Interurban centron!" Procedo enuiga. "Jes, 380—84!" Ekscitite mi atendas ĉe la aparato. Fine sonorigo.

"Hallo! Bleier!".

Malproksima voĉo respondas:

"Hallo! Bleier!".

"Bonan! Ĉi tie, ne miru, Forge! Aŭskultu, mi estas tute ekscitita. Mi ĵus legis pri via AELA. Prezroj neblaj".

Min interrompas voĉo tute natura, neniom surprizita, kvazaŭ tute ĉiutaga afero:

"Trankviliĝu! Ĉio estas en ordo. La afero estas simpla. Ĝis nun la Esperantaj libroj estis multekostaj. Tial ili vendiĝis en pli kaj pli malmultaj ekzempleroj. Sekve, ili devis fariĝi ankoraŭ pli multekostaj. Sekve ili vendiĝis en ankoraŭ pli malmultaj ekzempleroj. Jen la vera "peka cirklo", en kiu komencis jam tute sufokiĝi la Esperanta literaturo. Nun, kion ni volas fari? Turni la direkton en la cirklo. Doni malmultekostajn librojn, sekve vendi pli multajn ekzemplerojn, sekve ankoraŭ pli malaltigi la prezojn, sekve vendi ankoraŭ pli multajn ekzemplerojn. El la "peka cirklo" ni volas fari "virtan cirklon".

"Bonegaj ideoj!" mi konsentas, "Sed ĉu vi ne timas, ke la libristoj unuanime-unumane vin ŝtonumos?".

"Ne, ĉar ili nepre rekonos pli aŭ malpli frue, ke la malkara libro neniam malutilis al la libristoj. Ĝi ja kutimigas la homojn legi".

"Vi pravas! Estas fakto ke ekzistas miloj da Esperantistoj kiuj

avidas aĉeti librojn, sed pro la krizo ne povas elspezi tiom da mono. Sed ĝuste tiuj krizaj tempoj — ĉu vi ne timas ilin?”.

“Krizaj tempoj? Ili ĝuste favoras nian AELA. Ĉar kion la Esperantistoj faros sen AELA?...”

“Hallo! Tri minutoj pasis!” interrompas mistera voĉo.

“Ankoraŭ tri minutojn!” mi krias. “Vi estas terura optimisto!”.

“Mi dankas la komplimenton! La plano de nia AELA volas venki la krizon. Neniu havas monon, almenaŭ ne multan. Kontraŭ tiu malagrabra fakto oni povas batali nur per malaltaj prezoj. La ĝisnunaj prezoj, inter la nunaj cirkonstancoj, kondukus neeviteble al la ĉesigo de ĉia eldonagado, ĉar la libroj nehelpeble ŝimiĝus en la magazeno. Sed la kvaronigo, eĉ kvinonigo de ĉi tiuj prezoj povos savi la situacion. Precipe, ĉar oni ja povos pagi ankaŭ en partoj. Pripensu ke la membrojn de la AELA ŝargas monate malpli ol 1.5 sv. fr. do tage malpli ol 5 centimoj. Kaj por tiu sumo ili havos jare ses ampleksajn librojn, kaj krome ankaŭ recenzgazeton, kiu raportos vigle pri nia tuta literatura vivo”.

“Kion vi diras!” mi demandas surprizite. “Ankoraŭ recenzgazeton? Ne, tio estas tro, tio ne volas eniri mian kapon!”.

“Ĉu ne inde aniĝi? ĉu oni ne povas esperi, ke tiel oni tranĝos la krizon? Nia ŝipo certe estas bone ekipita, havas elektitajn ŝipanojn, prenis bonan direkton...”

“Bone, bone — ” mi diras nerveze, “Sed se oni ne havas eĉ kvin centimojn tage?”.

“Hallo! la dua triminuto pasis!” malagrabras ree la mistera voĉo.

“Ankoraŭ tri!” mi insistas kiel ebriulo, kiu mendas la trian botelon.

“Jes, ankoraŭ tri!” eĥas alia drinkemulo ĉe la transa fino de la drato. “Kion vi diris? Se oni ne havas”

“— se oni ne havas tiujn 5 centimojn!”.

“Kiujn centimojn?”.

“Nu tiujn diablajn 5 centimojn tage por esti membro de AELA?!...” mi krias ekscitite, ĉar mi volas elprofiti la lastajn tri minutojn.

“Nu, povas ja kuniĝi du personoj po 2.5 centimoj tage, aŭ tri personoj po 1.66 centimoj, ili povas kune legi kaj poste inter si dividi aŭ lotumi la librojn”.

“Mi komprenas”.

“Tial ankaŭ la programo estas tiel varia! Ĉiu trovos konvenan verkon por si! Jam la 640-paĝa interesege Enciklopedio de Esperanto valoras pli, ol la tuta sumo, kiun oni pagas por ĉiuj libroj!”.

“Bone, bone, bonege!”.

“Kion bezonas Esperanto? Librojn! Pli ol iam ajn! Por la

lingvo, por la movado, por la verkistoj! Librojn, por kiuj estas inde lerni la lingvon!" ekcitiĝas la voĉo ĉe la transa fino de la drato. "Ni povus diri sen fanfaronado: entrepreno tiel grava kaj utila por nia lingvo kaj movado, ke ĉiu esperantisto devas ĝin subteni! Sed ni tute ne volas voki al ia "esperantista oferemo" kiun ni tre alte taksas, sed je kiu ni jam delonge ĉesis kalkuli. Prefere ni povus diri, ke ni ne volas *ricevi* donacon, ni volas *doni* donacon. Sed ankaŭ tion ni ne diras".

"Momenton, haltu, ankoraŭ unu demandon!!" mi krias.

"Ĉi tie ne temas pri donaco, sed pri ambaŭflanka reciproka gajno, sur la bazo de prudenta kaj reala kalkulado".

"Unu gravan demandon: kiel vi imagas al vi la aferon kun la verkista..."

"Ni konstruas aerkastelon el ŝtono kaj ŝtalo kaj invitas loĝi la esperantistojn por la plej malalta luprezoo!..."

"Haltu, poeto! Nur unu demando: la verkista honorario!?!".

"Tri minutoj pasis!" krias la Fata Voĉo.

"Ĝis revido en Parizo!" la alia.

"He, he, hallo, ĉu la honorario same estos kvinonigata??..."

Responde la telefono sonoritis en miajn orelojn kaj eĉe ripe-tiĝas la bela frazo "Ni konstruas aerkastelon el ŝtono kaj ŝtalo kaj invitas loĝi la Esperantistojn por la plej malalta luprezoo..."

... Post unu horo alvenis telegramo. Mi ŝire malfermis ĝin. Miaj manoj tremis, kiam mi legis la tekston:

1000 membroj por AELA jam alighis stop malgrau  
prezredukto ni decidis duobligi verkistan honorarion

L. M.

Post tiu ĉi telegramo mi estis kortuŝita. En tiu ĉi momento mi konfesis, ke tiu ĉi AELA estas la plej mistera organizaĵo de Esperantujo, ke ĝi estas la plej grandioza entrepreno de la dudeka jarcento...!

Jean FORGE.

### PRI PROSPEKTO DE AELA

De ĉiuj niaj legantoj estas konata la literatura aktiveco kaj valoro de Jean Forge. Do, neniuj miros pri la vigla enhavo de tiu ĉi Intervjuo, kiun ni reproduktas el la paĝoj de la revuo "Literatura Mondo".

Certe, ne malpli altira estas la prospekto, kiun presigis AELA. (Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj) por propagandi siajn eldonadojn. Ambaŭ kaŭzis al ni tre agrablan impreson, kaj ni pensis tuj je niaj abonantoj kaj amikoj.

Ni alvokas vin tre atente kaj bone legi la enmetitan prospekton, kies prezoo kaj planoj certe surprizos vin. 2000 paĝoj por 13.50

## AMO

Ho, am' ne estas ludo,  
sed forta sorta trudo.  
Ĝi svingas sian vipon  
al lip' pelante lipon.

Ni timas ĝian baton,  
kapricon, senkompaton,  
sub ĝia jug' ni svenas...  
kaj tamen ĝin ni benas.

K. de KALOCSAY

## AMOR

Amor no és pas un joc,  
té la fúria del foc  
i esgrimeix els seus glavis  
fent ajuntar els llavis.

Temem els seus capricis,  
els seus cruels suplicis,  
sota el seu jou sofrim...  
i amb tot, el beneïm.

Trad. catalana de Jaume GRAU CASAS

---

svisaj frankoj estas kvazaŭ miraklo. Kaj la enhavo de la libroj! Ilin garantias la nomo de Literatura Mondo mem. Vi nur devas atenti la grandan Enciklopedio de Esperanto, kiu en si mem valoras pli, ol via kotizo. Ni petas vin, bonvolu ankaŭ atente legi la pago-kondiĉojn, ne forgesu aldoni al via kotizo ankaŭ la sumon por sendkosto kaj sendu vian aliĝon kaj monon sufiĉe frue al la indikataj adresoj, ĉar la ekspedejo de AELA sendos la librojn laŭ la alvenvico de la mono. La direkcio de AELA aparte informas vin, ke ĝi sendas al la plenpagintaj membroj la jam aperintajn librojn eĉ ekstervice. Tial estas por vi tre profite aliĝi tuj post trastudo de la prospekto kaj pagi koncernan sumon.



XVI-a KONGRESO DE K. E. F. KAJ XV-aj INTERNACIAJ  
FLORAJ LUDOJ EN LA URBO VENDRELL

(Pentekosto de 1933)

ORDINARAJ TEMOJ

*Originalaj Tekstoj*

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

*Tradukitaj Tekstoj*

- I. Traduko de fragmento de la konata tragedio de Angel Guimerá, "Maro kaj Ĉielo" (Mar i Cel).
- II. Traduko de fragmento de la fama dramo de la sama aŭtoro, "En la Malsupra Lando" (Terra Baixa).

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II. Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- III. Premio de "Kataluna Esperantisto". Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan tradukon.
- IV. Premio de la grupo "Barcelona Stelo", 50 pesetoj. Temo: Studo pri popolkantoj kaj popolkutimoj.
- V. Premio de la grupo "Paco kaj Amo", 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- VI. Premio de "Universala Esperanto-Asocio". Unu bela esperanta horloĝo. Temo: Laŭvola. (1)
- VII. Premio de Sro. Pau Casals. Artobjekto. Temo: Laŭvola (2).
- VIII. Premio de "Dalmau Liceo", 200 pesetoj. Temo: Etimologia klarigo de la diversaj formoj de minimume cent geografiaj nomoj de ĉefaj urboj.
- IX. Premio de "Literatura Mondo". Abono al la revuo dum la jaroj 1932-33. Temo: Laŭvola.
- X. Premio de la Redakcio de "L. M.". Preter la Vivo, Pilgrimo, de Julio Baghy; Streĉita Kordo, Eterna Bukedo, de K. Kalocsay; Romaj Elegioj, La Taglibro, de Goethe (ĉiuj bele binditaj). Temo: Laŭvola.
- XI. Premio de Sro. Jaime Carner, Ministro de la Hispana Respubliko, 100 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- XII. Premio de Pastro Joan Guilera, ĉefparoĥestro de Vendrell, 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- XIII. Premio de la gazeto el Vendrell, "El Baix Penedés" 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XIV. Premio de "Heroldo de Esperanto". Tutjara abono al la gazeto kaj unu lukse bindita ekzemplero de la verko de Herm. Haefker, "Jarmiloj Pasaŝas". Temo: Laŭvola.

XV. Premio de la Urbestro de Vendrell, 150 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XVI. Premio de Sro. Josep Aixalà, eminenta verkisto el Vendrell, 10 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XVII. Premio de "Casa Camadas". Artobjekto. Temo: Laŭvola.

XVIII. Premio de "Casa Mumbrú". Artobjekto. Temo: Laŭvola.

XIX. Premio de "Centre Industrial", 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

XX. Premio de Sro. Carles M. García Rodrigo, urba juĝisto. Artobjekto. Temo: Esperanto, grava ilo ĉe la universaligo de la Juro.

Pliaj premioj kaj temoj estas en preparo!

NOTO. La esperantistoj, kiuj deziras konkursi la Florajn Ludojn kaj bezonas koni ĉiujn detalojn pri premioj, kaj kondiĉojn pri sendado de manuskriptoj, bonvolu peti informojn, enmetante unu respondkuponon, al la redakcio de "Kataluna Esperantisto", carrer València, 245, Barcelona (Katalunujo).

(1) "U. E. A." sendos sian premion rekte al la gajninto.

(2) Sro Pau Casals, la mondkonata violonĉelkoncertisto, krom la menciita premio, ankaŭ donacos la *naturan floron* al la poetgajninto de la Originala versaĵo kantanta Amon.

## JUGANTARO DE LA XV-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

*Prezidanto:* Sro. Artur Domènech Mas.

*Sekretario:* Sro. Jaume Grau Casas.

*Voĉdonantoj:* F-ino. Maria Julivert, Sro. Manuel Rodellar, Sro. Joan Soler.

## ORGANIZA KOMITATO DE LA XVI-a KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

*Vendrell, Pentekosto de 1933*

*Prezidanto:* Sro. Francisc Guitart.

*Vic-prezidanto:* Sro. Jaume Marcè.

*Sekretario:* Sro. Salvador Esvertit.

*Vic-sekretariino:* F-ino. Maria Julivert.

*Kasistino:* F-ino. Hermínia Romeu.

*Voĉdonantoj:* Sroj. Joan Constantí, Lluís Corbella, Salvador Martorell, Ferran Ramon, Carles Soler, kaj Salvador Urpí.

## VANE!

Kun dolĉa voĉ' mallaŭte kantas,  
 En mia kor' la juna amo,  
 Silente sin denove flamo  
 En la animon forte plantas.

Travibras min ĉiela ĝojo,  
 Mi tute juna rekreiĝas,  
 Serene antaŭ mi heliĝas  
 La jam malluma vivovojo.

Sed ve! Tro baldaŭ tiu afero  
 Timplene cedas por teruro,  
 Premanta min kun senmezuro.

Kaj ĉiuj fortoj el infero  
 Min mokas ride kaj tirane  
 Kriante vane! vane! vane!

Adriaan KLOEK (Amsterdam)

### ELS FAMOSOS CURSOS DEL MÈTODE CSEH A BARCELONA

Tots els esperantistes hem llegit els resultats sorprenents dels cursos Cseh (pr. txé). Molts de nosaltres hem tingut ocasió de parlar amb esperantistes nascuts en aquests cursos, i hem pogut constatar amb quina correcció s'expressaven en l'idioma internacional. Els professors de l'Institut Cseh d'Arnhem són sollicitats a tot Europa i els èxits assolits on actuen, demostren d'una manera irrefutable, que el mètode de conversa Cseh és el millor sistema d'ensenyament d'idiomes.

La Federació Esperantista Catalana fa temps que tenia en estudi l'organització dels cursos Cseh a Catalunya. L'aspecte econòmic de l'empresa era de difícil solució. Però malgrat tot, guiats per l'amor a l'Esperanto i amb l'esperança d'atraure al nostre moviment un gran contingent de nous lluitadors, anem resoltament a la celebració dels esmentats cursos. Aquests tindran lloc des del mes de gener vinent, sota la direcció de la professora senyoreta Elinjo Pähn d'Estònia, el primer de la tanda del quals tindrà lloc a l'Acadèmia Cots, en les hores que per mitjà de la premsa diària es donaran a conèixer.

*Propagueu aquests cursos! Demaneu tota mena de detalls a la Federació Esperantista Catalana, València, 245, Barcelona.*

## BIBLIOGRAFIO

*Ora Masko*, de Rampo Edogaŭa, trad. el la japana J. Simomura. Eldonis: "Japana Esperanto-Asocio", Tokio, 1931. Volumo I, kun 112 paĝoj, bele presita kaj bindita, kun tute nigra kovrilo kie hele reliefigas ora masko.

Mirige estas, ke la traduko de tiu ĉi unua volumo de detektiva romano japana, estas preskaŭ perfekta: ĝia stilo superas la ordinaran kvaliton ĉe niaj verkistoj. La temo estas interesege; efektive oni legas kriminalromanon kun tute speciala nuanco de delikateco kaj poezieco. Sendube la verko "Ora Masko" estos unu el la plej bonaj aperintaj en Esperanto: ĝi estas ja la plej bona Esperanto-eldonaĵo el Japanujo, kiun ni vidis ĝis nun.

*Rimportretoj*, de K. Kalocsay. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝto, 1931. Plaĉa volumeto, kun 128 paĝoj. Dukolora kovrilo kun portreto de la aŭtoro.

Galerio de Esperantaj steloj, tekstas la subtitolo. Tre sprita priskribo de la plej konataj Esperanto-pioniroj, en belega kaj lertega versformo, kun iliaj portretoj. Vere Kalocsay estas granda homo, kun verve neelĉerpebla.

Du katalunaj esperantistoj estas en tiu galerio. Niaj samlandanoj trovos ankaŭ plaĉan portreton de al ni tre konataj geesperantistoj: Teo Jung, Robert Kreuz, Emma L. Osmond, Julio Baghy, Paul Bennemann, Th. Cart, Dietterle, Hohlov, Van Schoor, kaj aliaj.

*Tridek jarojn en la ora nordo*, de Jan Welzl. Tradukis kaj eldonis: Moraviaj Esperanto-Pioniroj, en Olomouc, 1931. Nova verko pri la vivo kaj moroj en arktaj regionoj. Volumo tre malbone bindita, kun 320 paĝoj, formato 16 x 22 cm., prezo 5 sv. fr. plus 10 % por sendkostoj.

Welzl estante junulo foriris el sia hejmo, piede li marŝis al Genova, de tie li veturis al Ameriko kaj reen preter Afriko kaj trans la Hindan Oceanon al Vladivostok kaj poste al Irkutsk, de kie li piediris trans Siberion ĝis la Arkta Maro kaj ekloĝis sur la insulo Nova Siberio inter Eskimoj, kie li ĉasis kaj negocis, akiris konsiderindan havaĵon kaj fine oni elektis lin landestro.

La legado de tiu ĉi libro, ĉefe en ĝia lasta duono, estas tre interesa. Ne la heroo verkis la libron, sed li rakontis al ĉeĥaj ĵurnalistoj kaj ĉi tiuj pacience kompilis la verkon, sur la bazo de la travivaĵoj rakontitaj de la kuraĝa ĉeĥa migrulo. "Tridek jarojn en la ora nordo", same kiel "Tra sovaĝa Kamĉatko" kiun ni recenzos en venonta numero, estas indaj sekvantoj de la eksterordinare valora "Per balono al la Poluso", kaj permesas esperi ke en nia kara lingvo floros ne nur beletristiko, sed ankaŭ literaturo pri vojaĝoj kaj aventuroj. Nun la sciencistoj kaj la artistoj devas vigliĝi.

La stilo, bona kaj kolorplena. Ni trovis nur kelkajn erarojn, aŭ pli ĝuste formojn iom tro naciismajn: *nepre anstataŭ absolute, entute anstataŭ tute, entute anstataŭ ĝenerale, mi decidiĝis, krom-ordinare, k. t. p.*

*Printempo en la aŭtuno*, de Julio Baghy. Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Koln, 1931.

Bela volumo 116 paĝa, kun plaĉa kovrilo. Tre agrabla kaj delikata romano, verkita de nia granda poeto, en kies prozo oni sentas la ĉarman Baghy-spiriton de liaj plej bonaj poemoj. Ni decide preferas la Baghy-poeton al la Baghy-prozisto. Tamen ni rekonas lian grandan valoron ĉiuflanke, kaj opinias, kun la eldonistoj, ke "Printempo en la aŭtuno" certe ne estas unu el la malpli valoraj prozaĵoj de nia hungara verkisto.

La eldono, tre zorgita, kiel ĉiuj faritaj de la eldonejo "Heroldo de Esperanto". Nur pri tiu ĉi semajna gazeto oni povas diri—korekte parolante—ke ĝi estas akurata. Nur unu preseraron ni trovis en la tuta libro: *ili anstataŭ ilia*, en la paĝo 68.

*Pri astro-fiziko*, mallonga klarigo por ordinaruloj. Verk-kompilis: L. Korinna. Wheatley Road 30, Halifax, Anglujo. Prezo: 1/4 spesmilo. Volumo 24-paĝa.

Ni prenis tiun libreton por legado, kun granda simpatio. La temo estas alloga, kaj la celo de la entrepreno de S-ro Korinna, tre interesa. Li anoncas, ke baldaŭ aperos simila libreto "Elementaj konsideroj pri materio". Sed ju pli valora estas verko el scienca vidpunkto, des pli valora ĝi estu el la vidpunkto lingva aŭ stila. Bonvolu la meritplena samideano Korinna peti helpon de iu lingva spertulo, aŭ igi sian amon al la lingvo, egala al lia amo al la scienco. Ĉu la esprimo "Klarigo por ordinaruloj" ne montras ian mankon de sento pri nuancoj?

*La gramofona kurso en Esperanto*, eldonita de Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, Svedujo, estis bone akceptata de la svedaj esperantostudentoj. En la kursoj oni ofte uzas ĝin por instrui la ĝustan elparolon. Pli ol cent kursoj jam estas venditaj. La kurso konsistas el tri diskoj, kiuj kostas kune 12 kr., kaj enhavas sur la unua disko modelan elparolon kun aparta instruado por svedoj, sur la dua ekzemplojn el la Fundamento kaj sur la tria dialogojn. La dua kaj tria diskoj enhavas nur Esperanton.

*Novspecan propagandilon* eldonis Eld. Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. Ĝi konsistas el malgranda mondatlaso, "La tuta mondo sur 14 landkartfolioj", uzata de diversaj firmoj kiel reklamilo. La eldoninto aldonis propagandan tekston pri Esperanto kaj vendas ĝin je prezo de sv. kr. 0,35. Ĝi estas vendata kiel mondatlaso, ne kiel propaganda broŝuro esperanta. Ĝi tamen servas kiel propaganda broŝuro.

J. G. C.

## ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—La ĵus fondita "Esperanta Grupo Frateco" el la kvartalo Les Roquetes, aranĝis, okaze de la fino de esperanto-kurso, tre belan feston, dum kiu oni honoris per agrabla donaco la esperantoprofesoron Sron. R. Fernàndez, kiu tiel fervore gvidis la finitan kurson dum kelkaj monatoj.

Ĉe la fino de la festo, la Prezidanto de la grupo "Paco kaj Amo", Sro. Pere Casanelles, diris kelkajn salutajn vortojn al la multnombra ĉeestantaro kaj kuraĝigis la finlernintajn kursanojn per siaj varmaj paroloj. Ĉe la eliro de tiu ĉi festo oni disdonis multajn flugfoliojn, kiuj anoncis la inaŭguron de nova kurso post tri semajnoj.

— Kiel ni anoncis en la antaŭa numero de nia revuo, la grupo "Paco kaj Amo" festis plejbrile sian arĝentjubilean daton, dum la pasinta Oktobra monato.

Dum la 15-a, vespere, ĉe ĝia propra ejo, okazis la inaŭgura festo antaŭ la ĉeesto de multaj delegitoj kaj prezidantoj de diversaj katalunaj esperanto-grupoj. Sro. Manuel Rodellar, el "Barcelona Stelo", je 'l nomo de lia grupo kaj de la ceteraj reprezentantoj, donacis al la Prezidanto de "Paco kaj Amo" belegan esperantistan flagon, arte orbroditan. Tondra aplaŭdado substrekis tiun emocian momenton, kiu finis la ĉarman feston.

Le sekvantan tagon, posttagmeze, oni aranĝis teatroprezentadon, kaj oni ludis esperanta-katalunlingvan komedion de nia amiko J. Gili Norta, kies argumento multe distris kaj ridigis la publikon. Poste sekvis komika komedio katalunlingva, kie nia prezidanto de K. E. F. Sro. Sebastià Alberich ludis plej *militisteme* kolonelan rolon.

Pli ol cent esperantistoj, inter ili fondintaj anoj de la grupo, ĉeestis la festenon kiu fermis la datrevenajn festojn de la grupo. Ĝi okazis la 23-an de la ĉi-supre menciita monato ĉe la restoracio El Rectorat el Les Planes, belega apudurba montarbaro.

Mankas al ni sufiĉa loko por iom detale priskribi tiun ĉi festenon ĉe kiu multaj grupaj kaj negrupaj samideanoj verŝis sian admiron, entuziasmon, fervoron kaj estimon al la plej malnova grupo el Katalunujo, al kiu ni deziras kelkajn jardudekvinojn da ekzistado.

Vic.—*Nova Zamenhof-strato*. La senlaca pioniro J. Comella atingis ke la ĉi-tiea Urbestro dediĉu unu el la novkonstruitaj stratoj je la memoro de nia kara Majstro. Gratulon al nia amiko kaj eternan dankemon al la urbo de niaj neforgeseblaj XI-a Kongreso kaj X-aj Internaciaj Floraj Ludoj!

Geedziĝo.—Sro. Josep Cantó, iama kasisto de K. E. F., kaj F-ino. Amàlia Altimiras geedziĝis. Longdaŭran feliĉon al la nova paro!

## **E**esperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

## **Federació Esperantista Catalana**

i a la vegada feu-vos abonat del seu òrgan oficial

## **Kataluna Esperantisto**

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:  
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

---

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

**Carrer València, 245. - - Barcelona**

# L I N G U A P H O N E

estas la plene scienca metodo por lernado kaj lernigado de

# E S P E R A N T O

kaj aliaj lingvoj praktike.

Estas libroj kun ilustraĵoj kaj traduko por la vido kaj kompreno.

Estas diskoj enparolitaj de Edmond Privat por la aŭdo, ripetado kaj lernado.

Petu senpagan propagando-broŝuron detale krarigan. Sciigu viajn nomon kaj adreson al,

L I N G U A P H O N E I N S T I T U T E en Barcelona

strato, València, 245.—Poŝtkesto, 319.

El pròxim número de

“Kataluna Esperantisto”  
serà dedicat a ressenyar els

## Jocs Florals Esperantistes

de l'últim Congrès Català d'Esperanto, que tingué lloc a Vinaroç.

Llegiu-lo